

ĈEA-retkomunikoj 4/2005

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxuiuj rete atingeblaj membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperantomovado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn.

Se vi tamen ne deziras ricevadi ilin, suficxas via mesagxo kun la teksto "Ne sendadu" en la temlinio al <petro@esperanto.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. 91-a UK-oj EN FLORENCO kaj 92-a en Jokohamo
2. Precizigo de la internaciaj Esperanto-arangxoj en Cxehxio en 2006
3. Du E-lernolibroj baldaux aperontaj
4. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas
5. Banko de promesoj
6. Bondeziroj

1. 91-a UK en FLORENCO kaj la 92-a UK en JOKOHAMO

Inter la tagoj 29-a de julio kaj la 5-a de auxgusto 2006 okazos jam la 91-a Universala kongreso de Esperanto en belega itala urbo Florenco. Al gxi jam aligxis 19 cxehxaj samideanoj, por kiuj estos organizita auxtobusa karavano el České Budějovice. Informojn pri la karavano povas al vi doni Miroslava Tomečková <mtomeckova@kpmg.cz>. Memoru, ke ekde la nova jaro altigxas konsiderinde la aligxkotizo, do hezitantaj decidigxu rapide! Pli da informoj pri la aligxkondicxoj cxe www.kava-pech.cz/uk aux <chrdele@kava-pech.cz> kun plilongigo de la limdato por viaj aligxiloj kaj pagoj al la 30-a de decembro. Al la sama retadreso bv. sendi viajn eventualajn interessignojn pri la partopreno de la 92-a UK en la japana urbo Jokohamo, ke oni antauxvidu, cxu estos suficxa nombro de interesatoj por povi organizi flugkaravanon.

2. INTERNACIAJ ESPERANTO-ARANGxOJ 2006 EN CxEHxIO:

Adonido (Hlaváček) en Ratíškovice - Vracov, de la 21-a gxis la 23-a de aprilo. Renkontigxo de amantoj de la naturo kaj bongusta vino. Inf.: melicharkova@quick.cz.

Semajna Lingva Seminario en Skokovy okazos de la 18-a gxis la 23-a de aprilo 2006 (printempa) kaj de la 16-a gxis la 22-a de oktobro (auxtuna) en la pensiono Espero en la vilagxeto Skokovy (nord-orienta Bohemio). Pli da informoj sur: www.mlboleslav.cz/esperanto aux drahotovaesperanto@seznam.cz

Ekoturisma Seminario (EKOTUR 2006) okazos de la 1-a gxis la 8-a de julio 2006 en la urbeto Dobřichovice apud Prago kaj ties cxirkauxajxo. La seminario invitas ekoturistojn - kaj biciklistojn kaj piedirantojn. Ili iom konatigxos kun la montetaro cxirkaux

Dobřichovice, kun Bohemia Karsto kaj dum unu tago ili vizitos ankaux Pragon. Nova estos la eblo boati dum unu tago laux la fluo de la rivero Berounka. Informoj: www.kava-pech.cz/ekotur

La 59-a Kongreso de Internacia Katolika Unuigxo Esperantista (IKUE) okazos de la 8-a gxis la 15-a de julio 2006 en la grava pilgrimloko Velehrad (suda Moravio). Specialan programon por junuloj organizos CxEJ. Informoj: www.ikue.org aux <http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek>, pri la junulara programo ikue@blahus.cz

La 28-a Renkontigxo de Esperantaj Familioj (REF) okazos de la 15-a gxis la 29-a de julio 2006 en Pilský Mlýn. Informoj: pavladvorakova@tiscali.cz

Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lančov kun Esperanto-kursoj: 3 etapoj (2-a gxis 15-a de julio, 16-a gxis 29-a de julio kaj 30-a de julio gxis 12-a de aŭgusto. Informoj: podhradska@volny.cz

La 56-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) okazos de la 12-a gxis la 19-a de aŭgusto 2006 en la vilagxo Strážné (la montaro Karkonosxo, nord-orienta Bohemio). Informoj: cea.polnicky@quick.cz

Internacia Paroliga Semajno (InPaSem) 2006
Kurso de Esperanto por komencintoj kaj lingva seminario por jamaj parolantoj. Gxi okazos de la 2-a gxis la 8-a de oktobro 2006 en la urbeto Dobřichovice (apud Prago), en la pensiono Sokol. Informoj kaj aligxiloj: www.kava-pech.cz/inpasem

Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI
okazos de la 6-a gxis la 8-a de oktobro 2006 en Dobřichovice (la lastajn 3 tagojn de InPaSem 2006). Informoj: chrdle@kava-pech.cz

Internacia Ekumena Diservo, la 7-an de oktobro en Dobřichovice.
Informoj: chrdle@kava-pech.cz

Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) 2006
okazos de la 10-a gxis la 12-a de novembro 2006 en la urbeto Dobřichovice (proksime de Prago) en la pensiono Sokol. La temo A (cxefa) estas: Lingvo kaj Interreto, la temo B: Studoj el diversaj fakoj. Informoj: www.kava-pech.cz/kaest

3. DU ESPERANTO-LERNOLIBROJ BALDAUX APERONTAJ

La eldonejo KAVA-PECH finpreparas du lernolibrojn de Esperanto, kiuj baldaux rixigos la cxehxajn librovendejojn. Temas pri "Esperanto por infanoj / Esperanto pro děti 2" fare de Jana Melichárková, kio estas dauxrigo de sxia sukcesa unua volumo, kiu jam aperis ankaux en Pollando en la traduko polen. Gxi estas bele ilustrita fare de Miroslava Tomečková kaj enhavas ankaux rimajxojn de Miroslav Malovec. La dua estas la tria eldono de la bone konata lernolibro "Esperantem za tři měsíce" (Per Esperanto post tri monatoj) fare de Petr Chrdle kaj Stanislava Chrdlová kun aktualigita fina parto (legolibro). Nova

estas ankaux la fakto, ke cxiu leciono de Esperantem za tŕi mĕsice estos kompletigita en la reto per senpage alireblaj ekzercoj, kiujn tiucele meminiate preparas Petr Melichárek.

4. CxehxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) preparigxas por kristnaska kaj novjara festoj. En la retpagxaro de CxEJ troviĝas pagxo kun bondeziroj kaj kiel donaco ligiloj al kelkaj senpage elsxuteblaj kristnaskaj kantoj en esperanto. Inter la 27-a de decembro kaj la 3-a de januaro du membroj (Marek BLAHUŠ kaj Jan URBÁNEK) partoprenos en Germanio tradicionan junularan arangxon Internacia Seminario, kiu kunigos 200 gejunulojn el 4 kontinentoj. Speciale por tiu arangxo preparis grupo de 8 kunlaborantaj membroj de CxEJ tradukon de la cxehxa filmfabelo Lotrando kaj Zubejda, kiun oni projekcios kun esperantlingvaj subtekstoj dum tiu renkontiĝo. CxEJ nun nombras 40 membrojn kaj en Prago ekfunkciis la 1-a loka junulara klubo, kies unuan kunvenon cxeestis 10 gejunuloj, inkluzive de du germanoj, kiuj nuntempe studas en Prago. Aktualajxoj kaj pliaj informoj pri cxehxa junularo troveblas cxe <http://www.esperanto.cz/cej>

5. BANKO DE PROMESAJ

La 4-an de decembro 2005 Renato Corsetti malfermis retan bankon de promesoj por esperantistoj (la anglan originalon esperantigis Tim Morley). <http://www.eo.pledgebank.com/> Cxiu povas publike fari promeson, ke li ion faros, se ankaux aliaj faros la saman promeson (Zamenhofa metodo de promesado). Ekzemploj: - verki 3 artikolojn por Vikipedio, se 10 aliaj promesos la samon - sendi lernolibron al triamonda lando, se 15 aliaj homoj promesos la samon - helpi al Internacia Televido per subtekstigo de iu filmo, se 4 aliaj promesos la samon ... cxu bona inspiro?

6. BONDEZIROJ

Cxi tio estas la lastaj cxijaraj CxEA-retkomunikoj kaj ni (= redaktokonsilio konsistanta el Jana Melichárková, Petr Chrdle, Jiří Tomeček, Pavel Polnický, Vĕra Podhradská, Vratislav Hirš, Miroslav Vaněk, Josef Hron, Miroslav Malovec kaj Marek Blahuš) deziras al vi agrablajn Kristnaskajn kaj jarsxangxajn festotagojn kaj firman sanon kaj cxion nur bonan dum la tuta jaro 2006. Kaj ni komune tostu: "vivu Esperanto!".